
# BONA ESPERO



*Cirkulero 52*

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.
prezidanto: Otto Nelken,
Hirschfeldstr. 6, D-59581 Warstein, telefono+fakso: 02902/57460
retadreso: u.nelken@t-online.de

Warstein, 99-03-30

Karaj amikoj kaj subtenantoj,

fine ni sukcesis! Antaŭ unu semajno oni povis aĉeti en Bona Espero la nepre necesan novan VW-buson per la mono, kiun ni estis „kunalmozpetintaj" post ĉirkau trimonataj klopodoj. Per helpo de multaj specialaj donacoj el komunaj kaj privataj fontoj ni povis kolekti grandan sumon aldone, t.e. ekskluzive por la akiro de la buso. Ĉi rilate ni dankas ĉi tie al ĉiuj membroj kaj donacantoj, kiuj per siaj specialaj kontribuoj ebligis tiun rapidan sukceson. Tiel amasiĝis parte grandegaj sumoj, ekz. okaze de magio-prezentadoj, naskiĝtagoj, enterigo k.t.p.. Ankaŭ Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia dankas tre kore al ĉiu speciala donacinto pro tia subteno.

Plia pozitiva okazaĵo estis la akcepto de 11 novaj infanoj, kiuj nun kompletigis la 16 (ne inkluzive Tota kaj Joao el Brazilio) infanojn de la antaŭa jaro: *Zelia* 5j., *Cristiane* 6j., (*Getulio*) 7j., *Janio* 7j., *Andreza* 7j., *Brirdiane* 8j., *Silvestalone* 8j.,, *Rafael* 11j., *Andrea* 12j., *Claudia* 12j., *Ildete* 11j.. La duono de la infanoj, ĉefe la plej grandaj, vojaĝas ĉiutage per lerneja buso al la publika lernejo en Alto Paraíso kaj returne. La alian duonon, plej parte la malgranduloj, oni lasas ĝis nun dum la semajno en la urba sidejo, precipe por ŝpari al ili la streĉiĝojn de 50 km longa transporto per la preskaŭ „antikva" aŭtomobilo sur malebena vojo. Lastatempe Ursula zorgas krome en la urba domo por ses pliaj infanoj, efektive nur dumtage. Momente ĉiuj 27 infanoj frekventas la publikan lernejon en Alto Paraíso, la plej multaj malgranduloj havas en *Adarci, Maria* kaj *Amanda* eĉ ekslernantinojn de BE kiel instruistinoj! Cetere ĉiuj 16 gelernantoj estas transigitaj en supran klason.

*Adarci* sukcesis sin inskribi por historio-kurso en la universitato, pli precize dum la semajnfinoj kaj la dumonataj ferioj, kaj ĉio financata per la lernejaj instancoj. Ŝia filio „*Igor* nun estas kvarjara, tre ĉarma, inteligenta knabo, kiu jam ekde januaro frekventas la lernejon. *Amanda* edziniĝis kaj atendas bebon baldaŭ", skribas Ursula. *Adarci* kaj *Maria*, kiuj ja loĝas en siaj propraj domoj apude ofte helpas, se oni bezonas ilian asiston. En februaro *Rosamira* komencis instrui Esperanton en granda lernejo en Brazilio, kun ŝanco ricevi baldaŭan instruisto-diplomon.
*Tota* kaj *Joao* intertempe trapasis siajn abiturientajn ekzamenojn kaj povis festi tiun specialan sukceson je la 18-12-98 same kiel *Andreia* kaj *Roberto* sian gefianĉiĝon. – Je la vespero de tiu tago en la urba domo in Alto Paraíso okazis kristnaskfesto kun pli ol 80 personoj, inter ili ankaŭ 50 eksbonesperanoj kaj aliaj vizitantoj, ekz. Christoph Wyneken el Germanio, la patro de la praktikantino Karolin, kiu donis muzikan formon al la festo.

Bedaŭrinde ekzistas ankaŭ negativa novaĵo – almenaŭ por la infanvilaĝo. Sonja Hey kaj ŝia fianĉo Fernando, sur kiuj kuŝis tiel multaj esperoj, decidis tute surprize tuj post ilia edziĝo havi propran bebon. Estante jam 42jara Sonja pensas, ke ŝi devas rapidi ĉi-rilate, kaj vere estas tre riska en tia aĝo, naski sian unuan infanon en BE, for de la civilizacio kaj de hospitalo. Tial ambaŭ forlasis BE en februaro.

„Feliĉe la bonaj gardanĝeloj de BE tuj organizis la alvenon de du junaj, ĉarmaj poloj Agnieszka kaj Krisztof, kiuj ĝis nun brile zorgas pri legomejo kaj kuirejo" kaj kiuj krome sukcese lernigas al la infanoj Esperanton. Bedaŭrinde nur ĝis la venonta junio , ĉar tiam la ambaŭ devas daŭrigi sian studon. Tial ankaŭ Karolin forlasis BE komence de januaro post kvarmonata staĝo. Ŝi pledis - krom la ĉiutagaj laboroj en la domo kaj la ĝardeno - antaŭ ĉio por la muzika instruo de la infanoj.

„La sugesto de Christoph Wyneken al Vania de Castro helpi per muzikoterapio instruante al la infanoj muzikon (kanto, gitaro, piano) por venki siajn psikajn malfacilaĝojn, pro perdo de gepatroj ekzemple, havas nekredeble bonan rezulton. Vania venas fidele ĉiun duan semajnfinon al BE; kelkaj infanoj vere brile reagas kaj sin dediĉas kun entuziasmo al la muzikinstrumentoj."

Unue efektive kaj ankoraŭ pli ol antaŭe grandaj esperoj kuŝas sur Gisela kaj Jean Passarella, la germana-franca geedzoj el Francio. Ambaŭ volas transloĝiĝi kun siaj du filinoj al BE plue en septembro 99. Ursula kaj Giuseppe klopodas – same plue – pri la prizorgo de la evideble longe dauraj kaj komplikaj formalaĵoj rilate al la restadpermeso por la familio.

Kaj kiu okazis krome en BE?
En ĉi tiu februaro Giuseppe, Santana kaj Krisztof faris belan pavimon en la manĝejo de BE per restantaj keramikoj de la urba domo.
La ĉiam bone kulturata legomejo donis al ĉiuj Bonesperanoj „grandan abundon da kukumoj, karotoj, laktukoj, kapsikoj, brasikoj ktp.. Kaj ni jam produktis 180(!) kg da marmelado de mangoj".
Same per helpo de specialaj donacoj oni aĉetis nepre necesajn novajn matracojn por la infanoj.
Ĝis tie la lastaj gravaj novaĵoj el Bona Espero!

Fine ni ŝatas saluti ĉiujn novajn membrojn koregе: ekde la lastjara septembro almenaŭ sep! Ni tre ĝojas pri ĉiu nova membreco, ĉar estas antaŭ ĉio la regulaj kotizoj, kiuj ĉefe ebligas longtempan planadon.

Ni denove dankas pro la multaj donacoj, same pro kelkaj bonaj sugestoj, ankaŭ el Nederlando kaj Svedio. Konsilo kaj ago, ambaŭ estas necesaj por sukcesa laboro en BE. Ni plue ĝojas pri ĉiu maniero de subteno por niaj klopodoj, t.e. ankaŭ pri proponoj same kiel konstrua kritiko, egale de kia enhavo.

Ĝojan paskon deziras al vi nome de la tuta estraro

Ps: Ĉiuj citaĵoj („..." ) devenas laŭvorte el la lasta letero de Ursula de lasta semajno.

---

**Donaco-konto:**
**Konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ / bankkodo 464 510 12)**
*La adreso de la kasistino:*
*Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, DE-59909 Bestwig, Tel.: 02904 / 6417*